



Mekanismo de fakuloj pri la rajtoj de Indiĝenaj Popoloj 5a sesio, Palaco de Nacioj, 09-13 julio 2012

Lingvoj kaj kulturoj

Deklaro de *Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de Asocio Nitobe por lingva demokratio kaj justeco*

La Kvina sesio de mekanismo de fakuloj pri la rajtoj de indiĝenaj popoloj traktos la rolon de lingvoj kaj kulturoj en protektado kaj antaŭenigo de la rajtoj kaj de la identeco de indiĝenaj popoloj.

Ĉiu homo havas almenaŭ unu lingvon, kiu estas ĝenerale nomata gepatra. Kutime la gepatra lingvo ne estas elektita sed denaske ricevita, ĉar ĝin transdonas gepatroj aŭ/kaj la medio. Ĝi estas do atribuaĵo de ĉiu persono, kiel haŭtkoloro aŭ sekso. Per la lingvo homoj organizas sian penson, ĝin komunikas, interŝanĝas informojn, interagas, kaj aktivigas en la socio. Tial, la eblo agadi per sia lingvo plene mastrata, kiu ĝenerale ĝuste estas la gepatra, estas antaŭkondiĉo por aktive vivi en la socio kaj kapabli vere civitani, ekzemple kapabli studi, labori kaj sin defendi en tribunaloj. Tio estas ĉies elementa homa rajto.

Sekve, protektado de la gepatra lingvo gravas ne nur kulture. Ĝi gravas antaŭ ĉio praktike, politike kaj ekonomie: temas pri respekto kaj plenumo de la konkretaj interesoj de la individuoj. Se lingvo perdas funkciojn en la socio, tio signifas malriĉiĝon por tiuj, kiuj ĝin parolas kiel gepatran lingvon, ne nur kulture, sed ankaŭ materie, ĉar tio malpligrandigas iliajn konkretajn ŝancojn aktivadi tiulingve en la diversaj kadroj de la vivo socia, politika kaj ekonomia.

Kie okazas lingva diskriminacio, tie gepatra lingvo, kiu ne estas la reganta (oficiala) lingvo en la socio, signifas al la koncerna individuo malfavoran pozicion rilate aliron al kleriĝo, al justico kaj al la labor-merkato. En tiuj medioj la statuso de la gepatra lingvo neeviteble influas ies kapablojn aktivi en la socio, kaj la prospero-ŝancojn entute. Defendo de la lingvaj rajtoj estas do grava parto de la defendo de la homaj rajtoj.

Garantii la eblon uzi sian gepatran lingvon en komunikado kun la institucioj, konsistigas nepran kondiĉon por ke individuo povu efektive kaj plene ĝui siajn politikajn rajtojn. Fakte, ŝtata aparato ne povas ne komunikadi. Ŝtato povas esti neŭtrala koncerne religiojn, sed ĝi ne povas esti neŭtrala rilate al lingvoj, ĉar ĝi nepre devas uzi almenaŭ unun lingvon por leĝaro, por funkciigi tribunalojn, lernejojn, komunikilaron. Ŝtatoj nescribantaj aŭ neparolantaj ne ekzistas. Sed la institucioj ne povas esti vere demokrataj se ili ne baziĝas sur komunikado inkluda, alirebla al ĉiuj civitanoj per sia unua lingvo, la gepatra. Lingva demokratio estas do fundamenta ero de la materia, politika demokratio.

Universala Esperanto Asocio (UEA) kaj Asocio Nitobe - por lingva demokratio kaj justeco substrekas, ke protekti la lingvajn rajtojn de indiĝenaj popoloj signifas ebligi al ili plenrajtan partoprenon en ĉiu sfero de la vivo kaj preventi ilian ekonomian, politikan malriĉiĝon.